

Du rakontoj en la lingvo internacia Esperanto.

# LA NOVA JARO

de

Boleslav Prus.

# JANKO-MUZIKANTO

de

H. Sienkiewicz.

El la lingvo pola tradukis A. Grabowski.

NÜRNBERG.

W. Tümmel's Buch- und Kunstdruckerei.

1891.



Du rakontoj en la lingvo internacia Esperanto.



# LA NOVA JARO

de

**Boleslav Prus.**



# JANKO-MUZIKANTO

de

**H. Sienkiewicz.**



El la lingvo pola tradukis A. Grabowski.



**NÜRNBERG.**

W. Tümmel's Buch- und Kunstdruckerei.

**1891.**

Biblioteka Uniwersytecka KUL



1001144554

Esper. 297 II




74/192.3/dz

# I.

## La nova jaro.

Rakonto de Boleslav Prus.

Tradukis A. Grabowski.



Antaŭhieraŭ estis granda movado en Varsovio, aŭ pli vere en la tuta Eŭropo. Se la vizitojn, leterojn kaj biletojn de vizito oni notadus sur la borso, ni havus ekzemplon de valoro, kiu en la tago de la unua Januaro de ĉiu jaro eksaltas supren almenaŭ per mil procentoj kaj falas poste ĝis la nulo.

En tiu ĉi tago oni detruas proporcie la plej multe da galoŝoj, pendiloj de pordo, koloro sur la plankoj, manetoj de sonoriloj, kaj kraĉo. Ĉiu havas iun por viziti. Ĉe tio ĉi neniu estas atendema je vortoj de la alia, kaj kredas nek al la aliaj, nek al si mem.

Dirante mallonge, sin formas senorda movado, en kiu la kondukantoj estas: la piedoj, la langoj, malplenaj kaleŝoj, kartoj litografitaj kaj la sendatuloj. Por tio ĉi en la koroj estas tute mallaŭte, en la kapoj mallume.

Tiu ĉi ĥaoso sin nomas: la novjaro gratulado. Nur la infanoj, al kiuj oni oferis neatenditajn donacojn, rigardas similan spektaklon kun bona kredo. La grandaĝuloj estas en humoro sufiĉe pesimista. La ricevantoj vizitojn penas kaŝi la oscedon, la gastoj penas ne movadi per la ŝultroj; la elpagantoj la donacojn ne havas bonan humoron kaj apenaŭ la ricevantoj havas iom pli vivajn sentojn, malbenante aŭ elridante la oferdonantojn.

Kelkaj, por liberigi sin de la gratuloj koraj kaj alportantaj la benadon de Dio, forkuras el la domoj aŭ metas sur sin libervolan depagon por la malriĉuloj. Ĉe la rigardo de

la rubriko: „Anstataŭ la novjaraj gratuladoj“ kontraŭvole oni volus demandi: Ĉu la 10 rubloj de sinjoro X. aŭ la 25 rubloj de sinjoro Y. estas la vidigo de lia kompato por la malriĉuloj aŭ de lia malamo por la amikoj kaj konatoj?

Kia forto transformas en tiu ĉi tago la homojn en vojirantan akridaron? Malnova kutimo — oni diris, kaj kelkan tempon oni kontentigis sin per tiu ĉi klarigo.

Hodiaŭ la vorto „malnova kutimo“, fariĝis senkolora kaj senenhava, kiel la afero mem, kiun ĝi devas klarigi. El tiu ĉi kaŭzo, mia instruita amiko, la dr. Oĥoroviĉ', eltrovis alian terminon, tio ĉi estas „resta apero (montriĝo) en la evolucio de la vivo societa“.

Tiu ĉi termino estis prenita el la regno de la zoologio kaj anatomio. En tiuj ĉi sciencoj „resta organo“ estas nomata tia organo, kiu iam antaŭe faradis al ia speco de bestoj servadojn efektivajn, sed nun servas por nenio.

Organoj restaj estas ekzemple la du fingroj postaj, ne tuŝantaj la teron — de certa speco de bestoj dikhaŭtaj, aŭ laflugiloj ĉe la struto kiu estas birdo jam ne povanta flugi. La haroj sur la homa korpo estas organo resta el tiu epoko, kiam niaj antaŭuloj rigardadis la vestaĵon kiel malnecesan, kontentigante sin per la propra haraĵo. La haroj sur la kapo de homo grandaĝa ne havas indon praktikan, kaj ili nur elvokas malnecesajn kostojn, dum en la aĝo knaba ili estis organo utila, per kiu la saĝaj instruistoj enverŝadis en niajn korojn kaj sentojn — la ideojn de l'o vera, bela kaj bona.

El tiu ĉi kaŭzo la homoj instruitaj senhariĝas, ĉar la haroj servas jam por nenio.

Fine nia festa frako, sen kiu oni ne povas esti bone vidata en la societo, estas organo resta el tiu epoko, kiam la homa speco komencis hontadi je la vosto kaj kovradis ilin per la helpo de tri kvaronoj de metro da teksaĵo.

Kompreninte kio estas „organo resta“, facile ni jam komprenos, kion signifas la oĥoroviĉa „resta apero en la evolucio de la homa societo“.

Jen!

Kial la servanto iradas post la sinjoro?

Tial, ke en opoko de la militoj de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, la kavalerio atakita de la fronto sin povis defendi mem, sed la flankojn ĝi devis sendanĝerigi per helpo de servantoj. En tiuj tempoj tia modo de irado havis pravon de ekzisto, hodiaŭ ĝi estas „resta apero“.

Kial la viro donas al la virino la dekstran manon?

En tempoj barbaraj la edzoj batadis iafoje la edzinojn. Tial se iu el ili intencis montri al ŝia duono bonvolecon, li metis al ŝi la dekstran manon sub la brakon, kiel se li dirus: „Vi vidas ja, ke mi nun nenion faros al vi!

Kial la amanto genuadas antaŭ sia adoratino?

Antaŭe la krimulo juĝita al la detranĉo de l' kapo, ek genuadis por fari plifacilon al la detranĉisto. En la tempoj liberalaj la amantoj uzis tion ĉi por la propra utilo, igante kompreni la fraŭlinojn, ke ili jam tute perdis la kapojn por la amataj.

Kaj kial la mastro eliras post la gastoj?

Tio ĉi estas ree resta apero, klare vidiganta, ke en la tempoj antikvaj la mastroj kontraŭ la amikoj estis malpli certaj je siaj vazoj kaj de la vestaĵo en la antaŭĉambro.

Ni vidas tial, ke estis epokoj, en kiuj la hodiaŭaj „restaj aperoj“ havis signifon plenan je vivo. Ŝajnas, ke ankaŭ multaj hodiaŭaj faktoj plenaj je enhavo fariĝos iam poste nur „restaj“.

Spiritoj pli altaj antaŭvidas tiun ĉi veneblecon kaj el tiu ĉi kaŭzo ni havas homojn, kiuj jam en niaj tempoj rigardas la pagadon — ekzemple de la leteroj de ŝanĝo en difinita termino — kiel restan aperon.

La malplej sprita legantaĵo eltrovos nun facile, ke la novjara gratulado apartenas al la restaj aperoj kaj estas sole la post-brilo de okazoj, ĉe kiuj la homoj eldiradis la vortojn: „Dio donu al vi feliĉon“! kun pulso pli rapida, kun temperaturo levita, kun okulo brilanta, sub la enfluo de la suprigita sento.

Sed kiaj estis la okazoj, kiaj homoj, kiaj sentoj? . . .

Kiu hodiaŭ ĝin scias! Se oni povus kolekti iliajn disŝutitajn cindrojn, reveki la vivon malvarmigintan kaj demandi . . . . . Ni ekaŭdus eble ne unu sciindan historion, ne unu utilan instruon.

Se iam, legantino, vi renkontos junan homon, al kiu viaj okuletoj, viaj kavetoj sur la vizaĝo, fine via busto — kaŭzos turnigon de kapo kaj aliajn simptomojn de malsaneco . . . . Se vi trovos vin iam solaj en la ĝardena dometo . . . Se li komencos paroli kunligite, mallonge kaj sen senco . . . .

Tiam permesu, ke li prenu vian maneton, kaj petu lin, ke li al vi klarigu: en kia tago ĉiuj gratuloj havis la signifon de sincereco?

Poste enskribu al vi tiun ĉi tagon, por ke vi sciu kaj en la malfrua maljuneco povu klarigi al viaj nepoj: kiam komencis la nova jaro por la mondo. Ne tiu nova jaro, kiun la sekigitaj astronomiistoj signadas per helpo de vitroj meridianaj kaj de horloĝoj elbatantaj la sekundojn, sed tiu ĉi, en kiu oni povis kredi al la vortoj, eĉ al la tro multe deziremaj.

Tio ĉi daŭras tre mallonge. La optika akso de la meridiana vitro kaj la novjara stelo apenaŭ en la daŭro de unu momento formas unu rektan linion, sed oni memoras tiajn aferojn, ah! tiel longe. Danke tion — la homoj havas kalendaron.

Sed antaŭ ol por vi alvenos la nova jaro, volu dume aŭskulti la sube donitan klarigon de la gratulado.

Via amanto farus tion ĉi certe pli precize, sed li — ne estas mi . . . .

La plej malnova riĉegulo de la mondo estis Ofir. Lia tero sin tiradis semajnon da vojo longen la Tigro. Li havis 2000 sklavojn, super ili 100 ekonomiistojn kaj laborestrojn, kaj grandan nombron da bruto.

Tio ĉi estis mallonge post la elpelo de la homo el la paradizo. La suno, kiu kun la akompano de la planedoj kuras ĉirkaŭ sesdek milionojn da mejloj en jaro, irante ĉiam



antaŭen ne havis ankoraŭ la tempon elveni trans la ĉirkaŭejo de la unuatempa vastaĵo. La homoj tiamaj jam ne vidis la lokon, el kiu alflugas kaj kien deflugas la animoj, kaj multaj el ili ĉesis kredi je la vivo eterna, kaj ankaŭ lje la rekompencoj kaj punoj. Tiu ĉi loko sin kaŝis jam post la steloj. Sed en tago bonvetera ankoraŭ oni povis vidi Jehovon sidantan sur ora trono kun jaspisaj kolonoj. Ĉirkaŭe — pli supre kaj pli malsupre — (tiel ĝi ŝajnis al la rigardantaj de la tero) pendis pesiloj de la homaj meritoj. Se iu mortadis, lia pesilo perdiĝadis. Se iu naskiĝadis, lian pesilon oni pendigadis, kaj tiam la telero, sur kiu kuŝis la trezoroj pasantaj kaj tiu, sur kiu estis la trezoroj eternaj — staris en egala mezuro. Nur kun la kurado de vivo, la unua aŭ la dua telero superpezadis.

Sed ĉar la vivon eternan oni perdis el la okuloj, kaj la vivo pasanta en tiuj ĉi tempoj estis bela, tial ĉiu preĝis je trezoroj pasantaj kaj estis des pli kontenta, ju pli multe lia telero superpezis sur la flankon pasantan. Nur la malriĉuloj, kiuj ne havis eĉ unu palmon kiel proprajĵo kaj la malliberuloj, kiujn oni batadis, vidis sur la ĉielo grandan riĉecon de trezoroj eternaj — kaj — ploris pro si.

La pesilo de Ofir ĉiujare pli forte sin mallevadis en la flankon de proprajĵo pasanta kaj ĉiuj lin enviis, kaj Ofir mem estis kontenta.

Unu tagon (Ofir jam havis 120 jarojn kaj iradante sin devis apogi sur la nepidoj), liaj ekonomiistoj kaj laborestroj transdonis al li la kalkulojn de la lastaj kolektaĵoj.

Estis 20 000 ŝafoj, 10 000 da bovato, 4000 elefantoj, 3000 sklavo, 500 azenoj, 100 000 mezuroj da rizo, 10 000 mezuroj da arba oleo kaj senfina nombro da aliaj objektoj. Ĉiu siklo elpruntita alportadis al la riĉegulo cent siklojn, kaj kiu ne pagadis la procenton, fariĝadis lia sklavo.

La komercistoj el la okcidento, kiuj aĉetadis rizon ĉe Ofir, cedrajn tabulojn kaj la haraĵon de bestoj, konfesis sub ĵuro, ke tiel granda riĉegulo kiel li, ankoraŭ ne estis sur la mondo.

Kaj Ofir ĝojis. Kaj kiam la suno subiris, subtenita de du nepidoj, li foriris dormi en ĉambron, kiu anstataŭ tegmento havis purpuran kurtenon super si.

Tio ĉi estis por Ofir granda tago, sed por la sklavoj tia sama kiel la aliaj.

Kiam ekblovis varmega vento de la sudo kaj dismovis la kurtenojn, la riĉegulo vidis el malproksime fajrojn ekbruligitajn ĉe la mueliloj, kiujn turnadis cent sklavoj forte katenitaj. Kaj se iu ekhaltis, aŭ volis elpreni akvon el la pluva kavo por malsekigi la lipojn sekigintajn, la laborestroj batadis lin per fortaj batiloj de la piedoj ĝis la kapo. Kaj tutan la nokton oni aŭdis en tiu flanko la bruadon de la mueliloj, la sonadon de la ĉenoj, la frapadon per batiloj kaj la plendan kriadon de la sklavoj. Nur iatempe la muelilo subite ekhaltis, kio estis la signo, ke iu sklavo elspiris la animon, kaj tiam lian pesilon oni forprenis el la ĉielo.

Kiam ekblovis pli malvarma vento de la nordo kaj dismova la kurtenojn, la riĉegulo vidis en tiu flanko longan serion da subterejoj, kie dormis la sklavo. El tie alflugadis al li la ronkado de la lacigitaj per laboro, la plorado de la patrinoj kaj la plendado de la infanoj. Iatempe homo kovrita per pezego de alia, ĉar estis mallarĝe en la subteraĵoj, levis sin el la sonĝo kaj penadis elmeti sin supren, kaj tiam la aliaj malbenadis lin kaj puŝadis, ke li ne permesas dormi al ili. Kelkfoje iu faladis en malagrablan malsekaĵon — kaj subirante en ĝin, kriadis. Al la aliaj la malbona vermaro ne permesis ekdormi kaj tiuj ĉi, sidante paroladis inter si pri pli bonaj tempoj.

Iatempe sur la ĉielo ekmontris sin nova pesilo, sur kiu la trezoroj eternaj kaj la trezoroj pasantaj staris en egala mezuro. Tiam Ofir vidis, ke por li alvenis unu sklavo. Dispensante ĉion, kion li vidis kaj aŭdis, li diris al si, ke ĉio estas bona.

Li volis preĝi por tiom da bonfaroj kaj levis la okulojn al la ĉielo. Tie sur la ora trono kun jaspisaj kolonoj sidis la granda Jehovo, kun vizaĝo trankvila kaj rigardis malprok-

simen, malproksimen, ĝis kie la fulmo de liaj rigardoj kreadis novajn etaĝojn de la senfineco kaj grandegajn mondojn.

Tiam Ofir ekpensis.

— Kio estos, se la Sinjoro ekrigardos sur min? Ĉu sub lia rigardo ne disfalus en polvon la tuta tero?

Tiam li ekvidis sur la kapo de la Ĉiopovanta pesilon kun la surskribo: Pesilo de Ofir'. Unu el la pesteleroj kun la „trezoroj eternaj“ estis tiel malpeza, ke ĝi levadis sin supren, ĝis tien, kie jam nenio estis. La dua telero kun la „trezoroj pasantaj“ ŝajnis ĉiam malleviĝadi super la pensiĝa frunto de la Kreisto. Kiom da fojoj iu sklavo ekĝemis, aŭ la ŝnurbatilo ekfrapis, aŭ virino ekploris, — tiom da fojoj la telero de „trezoroj pasantaj“ malleviĝis pli forte, ke eĉ la brako de pesilo kurbiĝadis.

Ankoraŭ momento kaj la Ofira pesilo ekfrapos la Eternulon . . . .

La riĉegulo fortege ekstremis kaj eksentis teruran doloron. Ŝajnis al li, ke la plej multe vundita sklavo, supersutita en sia malsekaĵo per la vermaro — estas pli feliĉa ol li.

Kaj dume la mueliloj bruadis, sonoradis la ĉenoj, plende kriadis — la homoj kaj la pesilo de Ofir faladis ĉiam pli malsupren.

En la oriento montris sin blanka randeto. La suno ne povis eliri super la teron, el timo, por ne vidi, kiel la Sinjoro ekfrapas la pesilon de la riĉegulo. La arboj fermis la foliojn, la birdaro falis sur la teron, kaj la sovaĝaj bestoj kaŝadis siajn vizaĝojn en la sablo de la dezerto.

La tuta mondo atendis ian grandan malfeliĉon.

Tiam Ofir elmurmuretis per la bluiĝinta buŝo:

— Mian tutjaran ricevitajon mi donas al la sklavoj! . . . .  
Sur la ĉielo la pesilo ekstremis kaj la telero de trezoroj pasantaj ekiris iom supren, kvankam malproksime ĝi estis de la trezoroj eternaj.

La mondo respiris kaj montris sin randeto de la suno. Ofir kunvokis la ekonomiistojn kaj ordonis ĉesigi ĉiujn laborojn en hodiaŭa tago, kaj poste venigi antaŭ li la sklavojn.

La pesilo sin ree supren eklevis.

Kiam alvenis la mirigitaj kaj terurigitaj sklavoĵoj, Ofir diris al ili:

— Vi estos banitaj hodiaŭ en akvo pura kaj viaj vundoj estos ŝmiritaj per oleo.

La pesilo iradis supren.

Anstataŭ nuksoj de kverko vi manĝos farunon. La ĉenojn oni forprenos de vi kaj ĉesos vin batadi. Vi ricevos tolon por vi kaj por viaj edzinoj kaj po du sikloj da mono.

La pesilo iradis supren.

La sklavoĵoj komence silentis el timo: ĉu ilia sinjoro ne perdis la prudenton? Sed kiam oni komencis disdonadi al ili: arban oleon, tolon, kaj po du sikloj da mono, levis sin la ekkrio de tri miloj da vunditaj homoj:

— Ke Dio vin benu! . . . Ke li donu al vi feliĉon! . . .

La pesilo ĉiam iradis supren kaj oni jam vidis la teleron de la trezoroj eternaj — kvankam ankoraŭ tre alte.

La sklavoĵoj diskuris en la proksiman urbeton kaj komencis aĉetadi ludilojn por la infanoj. Unu kaptis batileton, alia argilan fajfilon, alia paperan kozakon aŭ krakileton.

Kaj kiam ili revenis en siajn kavernojn, oni ekaŭdis aferon nekutiman. Jen anstataŭ la ploro de virinoj kaj la plendado de infanoj, estis aŭdataj ridoj, krioj, fajfadoj, pafadoj per la batiloj, kaj kraketado.

La pesilo de Ofir atingis subite egalpezon kaj la riĉegulo fariĝis kiel infano, kiu venante sur la mondon havas tiom da trezoroj tempaj kiel da eternaj.

Tiam Jehovo, al kies oreloj alflugadis nur ploro kaj plendoj, ekaŭdinte en la lando de Ofir ridojn, benadojn, fajfadon kaj ĝojan bruadon de infanoj, — ekmiris.

Kaj deturninte sian ĉiopovantan rigardon de la senfinaĵo, en kiun ĝi estis profundiĝinta — Li ekrigardis Ofiron.

La maljunulo falis kiel se cent tondroj lin estus frapintaj kaj jam ne releviĝis. Lian animon, senkulpan kiel infano, ekkaptis vento supertera kaj forportis en malproksiman landon, kie Adamo kun Eva' ĝuas eternan junecon kaj kie la

kompatema Ablo alpremas al la propra brusto la superversitan per larmoj fratmortiginton Kaimon.

La historio de Ofir fariĝis glora en la tuta mondo kaj longan tempon regadis post li sur la tero la timo de Dio.

Por remomoro la filoj, nepoj kaj nepidoj de Ofir, ĉiujare post la kolektadoj kaj kalkuloj, donadis al siaj sklavoj tagon de ripozo kaj multajn donacojn, ricevante kiel ŝanĝo, la preĝojn, benojn, gratulojn kaj dezirojn de ĉia bonfarto.

Sed la suno kun la akompanaĵo de planedoj kuradas ĉiam antaŭen kun la rapideco de sesdek milionoj da mejloj ĉiujare, kaj tial la homoj perdis el la okuloj la lokon, el kie venas kaj kien revenas la animoj, sed kio estas pli malbone — ili jam ne vidas Jehovon kaj la pesilojn kun trezoroj tempaj kaj eternaj.

La historio de Ofir, irante tra miloj da generacioj, silentiĝis. Kaj liaj donacoj por la sklavoj disdonitaj el amo por Jehovo, fariĝis poste „resta apero en la vivo de la homaj societoj“.


La riĉaj gratifikas ankaŭ hodiaŭ en la nova jaro, detirinte antaŭe la sumon de la elservitaĵoj. La sklavoj ankaŭ hodiaŭ ilin benas, malbenante en la animo.

Kaj kio fariĝas kun la pesiloj sur la ĉielo, kia telero pli forte superpezas? Kiu ĝin scias! . . . .

La Ĉiopovanto ankaŭ, al kies oreloj alflugadas multaj krioj de ĝojo, sed multaj malbenoj kaj ploroj, jam ne rigardas sur la teron. Li ja donis al la mondo leĝojn neeraraĵn, al la homoj lertan prudenton kaj kompaton, — kion pli oni volas de Li?

Semu sur la tero, kio estos la plej multe laŭ via gusto, memorante la venontajn kolektojn. Sed havu tiom da prudento kaj hontemo, por ne miri iam poste je la fruktoj de via propra laboro kaj deziroj.

Fino.



## II.

# Janko-Muzikanto.

Noveleto de H. Sienkiewicz.

Traduko de A. Grabowski.

---

Ĝi venis sur la mondon malfirma kaj malforta. La bap-  
taninoj, kiuj sin estis kolektintaj apud la lito de la naskin-  
tino, balancadis la kapojn super la patrino kaj super la infano.  
La forĝistedzino Ŝimonova, kiu estis la plej saĝa, komencis  
konsoladi la malsanan:

— Donu — ŝi diras — mi ekbruligos super vi la kan-  
delon de morto; ĉar el vi jam nenio estos, mia amikino: vi  
jam devas pretiĝadi por la alia mondo kaj venigi la pastron-  
bonfariston, por ke li al vi pardonu viajn pekojn.

— Ba! — diras dua — kaj la knabon oni tuj devas  
bapti; li eĉ ne alatendos la bonfariston, kaj, ŝi diras, bone  
estos, ke li almenaŭ ne mortu sen bapto.

Tiel parolante, ŝi ekbruligis grandan vaksan kandelon,  
kaj poste, preninte la infanon, superverŝis ĝin per akvo, ke  
ĝi komencis fermadi la okuletojn, kaj ŝi diris ankoraŭ:

— Mi vin baptas en la nomo de l' Patro kaj de l' Filo,  
kaj de l' Spirito Sankta, kaj donas al vi la nomon Jan', kaj  
nun animo kristana, iru, el kie vi venis. Amen!

Sed la animo kristana ne havis tute la deziron iri, el  
kie ĝi venis, kaj forlasi la malfirman korpon; kontraŭe, ĝi  
komencis batadi per la piedetoj de tiu ĉi korpo, kiel ĝi nur  
povis, kaj plori, kvankam tiel malforte kaj malĝoje, ke, kiel  
diris la baptaninoj: „Oni povus pensi: katido, aŭ io alia!“

Oni sendis venigi la pastron; li alveturis, faris la sian  
kaj forveturis: al la malsanulino fariĝis pli bone. Post se-

majno la virino eliris al la laboro. La knabeto apenaŭ „spiretadis“ sed li spiretadis, ĝis en la kvara jaro je l' printempo la kukolo superkukolis la malsanon, tial li pliboniĝis kaj en suferebla sano atingis la dekan jaron de l' vivo.

Malgrasa li estis ĉiam kaj bruligita de suno, kun ventro elblovita kaj enfalintaj vangoj; li havis harojn lumajn, preskaŭ blankajn, kiuj faladis sur la lumajn, larĝe mal-fermitajn okulojn, rigardantajn la mondon, kiel se ili rigardus en ne-mezureblan malproksimon. En la vintro li sidadis post la forno kaj ploretadis mallaŭte pro malvarmo kaj iafoje pro malsato, kiam la patrineto nenion havis por meti nek en la fornnon nek en la poton; en somero li iradis en ĉemizeto ĉirkaŭligita per randeto de ŝtofo kaj en pajla ĉapelo, sub kies ŝirita tegmenteto li elrigardadis, levante kiel birdo la kapon. La patrino, malriĉa vilaĝanino, vivanta tagon post tago kiel hirundo sub malpropra pajla tegmento, eble lin amis siaspece, sed ŝi batadis lin sufiĉe ofte kaj nomadis „sentauĝulo“. En la oka jaro li iradis jam kiel garda knabo post la bruto, aŭ, se en la domo nenio estis por manĝi — kolekti fungojn en la arbaro. Ke lin tie iam lupo ne manĝis, estis nur kompatato de Dio.

Li estis knabo malsprita kaj kiel la vilaĝaj infanoj, ĉe la parolado kun homoj, metanta fingron en la buŝon. La homoj eĉ ne promesis al si, ke li vivos, kaj ankoraŭ malpli, ke la patrino povus alatendi konsolon el li, ĉar ankaŭ por la laboro li estis mallerta. Oni ne sciis, el kie li venis tia sur la mondon; sed por unu afero li estis pli impresa, tio ĉi estas por la muziko. Ĉie li ankaŭ ĝin aŭdis, kaj kiam li nur iom elkreskis, tiam li jam pri nenio alia pensis. Li iras, ekzemple, en la arbaron post la bruto aŭ kun la dupoto por kolekti fragojn, tiam li revenas sen fragoj kaj diras:

— Patrinetato! en la arbaro tiel io ludis! Oj! Oj!

Kaj la patrino respondas:

— Mi ekludos al vi, ekludos! ne timu!

Kaj iafoje ŝi faris al li muzikon per ligna kulerego. La knabo kriis, promesadis, ke li jam tion ne faros, sed tamen

li pensis, ke tie en la arbaro io ludis... Kio? ĉu li sciis?... La pinoj, fagoj, betuloj, oriojoj, ĉio ludis: per unu vorto-tuta l' arbaro!...

La eho ankaŭ... En la kampo ludis al li la artemizio, en la ĝardeneto apud la domo pepadis la paseroj, ke la ĉerizujoj tremis! En vesperoj li aŭskultadis ĉiujn voĉojn, kiuj estas en la vilaĝo kaj kredeble pensis al si, ke la tuta vilaĝo ludas. Kiam oni lin sendis al laboro, por ke li disĵetadu la sterkon, eĉ la vento ludis al li en la forkego.

Tiel unu fojon la laborestro, ekvidis lin starantan kun disĵetitaj haroj kaj aŭskultantan la venton en ligna forkego... ekvidis, kaj deliginte la rimenon, donis al li bonan memoraĵon. Sed kion tio ĉi utilis! La homoj nomis lin „Jankomuzikanto“!... En printempo li forkuradis el la domo por fari fajfilojn ĉe la rivereto. En noktoj, kiam la ranoj komencis kvakadi, la ortikoj sur la herbejoj triladi, la ardeoj super la roso bruadi, kiam la kokoj kantis post la bariloj, li ne povis dormi, li nur aŭskultadis, kaj Dio sola scias, kian muzikon li ĉiam aŭdis. En la preĝejon la patrino lin ne povis preni, ĉar kiam ektondras la orgenoj, aŭ kiam oni ekkantat per dolĉa voĉo, al la infano la okuloj tiel sin kovras per nebulo, kiel se ili jam ne rigardus el tiu ĉi mondo...

La nokta gardisto, kiŭ iradis tra la vilaĝo kaj, por ne ekdormi, kalkuladis la stelojn sur la ĉielo aŭ paroladis mallaŭte kun la hundoj, vidis ofte la blankan ĉemizeton de Janko, transkurantan en la mullumo al la vilaĝa gastejo. Sed la knabo ne iradis en la gastejon, nur apud la gastejon. Tie sidiĝinte ĉe la muro li aŭskultadis. La homoj dancis la „obertason“ iafoje ia juna vilaĝano ekkriis: „U—ha“! Estis aŭdata la frapado de botoj aŭ la voĉoj de knabinoj: „Kio?“ La violonoj kantadis mallaŭte: „Venis ili, ni kun ili: manĝi, trinki kaj babili“ kaj la violono-baso per profunda voĉo akompanadis: „Donu Di'! Donu Di'!“ La fenestroj brulis de lumo kaj ĉiu ligna kolono en la gastejo ŝajnis tremi, kanti kaj ludi, kaj Janko aŭskultis!...

Kion li donus por tio, se li povus havi tian violonon



ludantan alte: „Venis ili, ni kun ili: manĝi, trinki kaj babili“. Tiajn tabuletojn kantantajn. Ba! sed kie ĝin ricevi, kie oni faras ilin? Se oni almenaŭ permesus al li eĉ unu fojon preni en la manon ion similan!... Ne! Permesita estis al li nur aŭskulti, tial ankaŭ li aŭskultis kutime tiel longe, ĝis la voĉo de la gardisto elvokis post li el la mallumo:

— Ĉu vi ne iros domon, turmentulo?

Tiam li forkuradis sur siaj nudaj piedoj la domon, kaj post li iris en la mallumaĵo la voĉo de la violonoj: „Venis ili, ni kun ili: manĝi, trinki kaj babili!“ kaj la grava voĉo de la violono-baso: „Donu Di’! Donu Di’!“

Se li nur povis aŭdi la violonon, ĉu dum la festo de kampaj tranĉistoj, ĉu dum ia festo de edziĝo, por li ĝi estis tre granda festtago. Li rampis poste post la fornon kaj ne parolis tutajn tagojn, elrigardante kiel kato per la brilantaj okuloj el la mallumo. Poste li faris mem al si violonon el tegmenta tabuleto kaj el ĉevalaj vostharoj, sed ĝi ne volis ludi tiel bele kiel la violono en la gastejo. Ĝi sonis mallaŭte, tre mallaŭtete, tute kiel iaj muŝetoj aŭ kuloj. Li ludis tamen je ĝi de l’ mateno ĝis la vespero, kvankam li ricevadis por tio tiom da puŝoj, ke fine li elrigardis kiel batita pomo nematura. Sed tia jam estis lia naturo. La mizera infano malgrasiĝadis ĉiam pli multe, la ventron li havis sole ĉiam grandan, la haraĵon ĉiam pli densan kaj la okulojn ĉiam pli larĝe malfermitajn, kvankam la plej ofte superversitajn de larmoj, sed liaj vangoj kaj la brusto enfaladis al li ĉiam pli profunde, pli profunde . . .

Li tute ne estis kiel aliaj infanoj, li estis kiel lia violono el tegmenta tabuleto, kiu apenaŭ sonetadis. En la tempo antaŭ la kolektado el la kampo li preskaŭ mortadis de malsato, ĉar li vivis la plej ofte per karoto nekuirita kaj ankaŭ per la deziro posedi violonon.

Sed tiu ĉi deziro alportis al li nenion bonan.

En la palaco violonon havis la lakeo kaj ludis iam je ĝi en griza horo vespera por plaĉi al la ĉambristino. Janko iafoje subrampadis inter la grandfoliaj bardanoj, ĝis la mal-

fermita pordo de l' antaŭĉambro, por ŝovi bone ĝin rigardadi. Ĝi estis pendanta sur la muro kontraŭ la pordo, tial la knabo elsendadis al ĝi tutan sian animon, ĉar ŝajnis al li, ke tio ĉi estas sanktaĵo neatingebla por li, kiun tuŝi li estis ne inda, ke ĝi estas la plej kara lia amado. Kaj tamen li ĝin deziris. Li volus almenaŭ unu fojon havi ĝin en la mano, almenaŭ rigardi ĝin pli proksime... La malfeliĉa malgranda vilaĝana koro tremis de feliĉo ĉe tiu ĉi penso.

En certa nokto neniu estis en la antaŭĉambro. La gesinjoroj delonge estis en la alilando, la domo staris malplena, tial la lakeo sidis sur la dua flanko ĉe la ĉambristino. Janko, kaŝita en la bardanoj, rigardis jam longe tra la malfermita larĝa pordo sur la celon de ĉiuj siaj deziroj. La luno sur la ĉielo estis tiam plena kaj leviĝadis malrekte en la antaŭĉambron, tra l' fenestro, rebatante ĝin en formo de granda luma kvadrato sur la kontraŭkuŝanta muro. Sed tiu ĉi kvadrato proksimiĝadis malrapide al la violono, fine tute ĝin superlumis. Tiam en la malluma profundaĵo ŝajnis, kiel se de la violono radius lumo arĝenta, precipe la flekso estis lumigata tiel forte, ke Janko apenaŭ povis rigardi ĝin. En tiu ĉi brilo ĉio estis bonege videbla: la entranĉitaj flankoj, la kordoj kaj la fleksita maneto. La tiriloj de kordoj ĉe ĝi lumis kiel vermetoj de l' sankta Johano, kaj longen pendis la arĉo en formo de stango arĝenta...

Ah! ĉio ĉi estis belega kaj preskaŭ magia; Janko ankaŭ rigardadis ĉiam pli dezireme. Sidante en la bardanoj, kun la brakoj apogitaj sur la malgrasaj genuoj, kun buŝo malfermita li rigardadis. Jen timo lin retenadis sur la loko, jen ia nevenkebla deziro puŝadis antaŭen. Ĉu tio estis magiaĵo, aŭ io alia?

Sed la violono en la lumeco de tempo al tempo ŝajnis proksimiĝadi, kvazaŭ naĝi al la infano... Je momentoj ĝi estingiĝadis, por ree ekradii ankoraŭ pli forto! Artoj magiaj, videble artoj magiaj! Dume la vento ekblovis, la arboj mallaŭte ekbruis, la bardanoj ekmurmuris kaj Janko ŝajne ekaŭdis kompreneble:

— Iru Janko! en la antaŭĉambro neniu estas . . .  
iru Janko!

La nokto estis klara kaj luma. En la palaca ĝardeno apud la lageto la najtingalo komencis kanti kaj fajfi jen mallaŭte, jen pli laŭte: „Iru, iru, prenu!“ La honesta nokta korvo per mallaŭta flugo turniĝis super la kapo de l' infano kaj elvokis: „Janko ne! ne!“ Sed la nokta korvo forflugis kaj la najtingalo restis kaj la bardanoj ĉiam pli kompreneble murmuradis: „Tie neniu estas!“ La violono ree ekradiis . . .

La mizera, malgranda kunpremita formo malrapide kaj singarde sin movis antaŭen, kaj dume la najtingalo mallaŭtete fajfadis: „Iru, iru, prenu!“

La blanka ĉemizeto briletis ĉiam pli proksime de l' pordo antaŭ-ĉambra. Jam ne kovras ĝin la nigraj bardanoj. Sur la porda ŝtupo de l' antaŭ-ĉambro oni aŭdas la rapidan spiradon de la malsana brusto de l' infano. Ankoraŭ minuto, la blanka ĉemizeto perdiĝis, jam nur unu nuda piedeto restas post la porda ŝtupo. Vane, nokta korvo, vi transflugas ankoraŭ unu fojon kaj vokas: „Ne! Ne!“ Janko estas en la antaŭĉambro.

Tuj laŭte ekkvakis la ranoj en la lageto de l' ĝardeno, kiel terurigitaj, sed poste ili silentiĝis. La najtingalo ĉesis fajfi, la bardanoj murmuri. Dume Janko rampadis mallaŭte kaj singarde, sed tuj lin ĉirkaŭprenis la timo'. En la bardanoj li estis kiel ĉe si, kiel sovaĝa besteto en la arbetaroj, kaj nun li estis kiel sovaĝa besteto en la kaptilo. Liaj movoj fariĝis rapidaj. la spirado mallonga kaj fajfanta, kaj al tio ĉirkaŭprenis lin la mallumo. Mallaŭta somera fulmo transkurinte inter la oriento kaj okcidento, superlumis la internaĵon de l' antaŭ-ĉambro kaj Jankon sur la kvaroj antaŭ la violono kun kapo supren levita. Sed la fulmo estingiĝis, la lunon kovris nubeto kaj jam nenion oni povis nek vidi nek aŭdi.

Post momento el la mallumo elvenis sono mallaŭteta kaj plora, kiel se iu negardeme ektuŝetis la kordojn kaj subite . . .

Ia basa dorma voĉo elvenanta el la angulo de l' antaŭ-ĉambro demandis kolere:

— Kiu tie?

Janko retenis la spiron en la brusto, sed la dika voĉo demandis la duan fojon.

— Kiu tie?

Alumeto ĵetis sian brilon sur la muron, fariĝis lume, kaj poste . . . Eh Dio! Oni aŭdas malbenojn, batojn, la ploron de infano, vokadon: Ho! pro Dio! la bojadon de hundoj, kuradon de lumoj sur la vitroj de fenestro, krion en la tuta palaco:

La duan tagon la malfeliĉa Janko staris jam antaŭ la la juĝo ĉe la vilaĝa juĝisto.

Ĉu ili devis lin tie juĝi kiel ŝteliston? . . . Certe. Ekrigardis lin la juĝisto kaj la ĉesidantoj, kiel li staris antaŭ ili kun la fingro en la buŝo, kun larĝe malfermitaj terurigitaj okuloj, malgranda, malgrasa, batita, ne scianta kie li estas kaj kion oni volas de li? Kiel juĝi tian nuizeron, kiu havas dek jarojn kaj apenaŭ staras sur la piedoj? Sendi ĝin en la malliberejon, aŭ kiel? . . . Oni devas ja havi iom da kompato por infanoj. Ke lin prenu la gardisto, ke li donu al li per la vergo, por ke li duan fojon ne ŝtelu, kaj finita la afero.

— Nature!

Oni vokis Staĥon kiu estis la gardisto:

— Prenu lin kaj donu al li memorajon!

Staĥo ekbalancis sian malprudentan bestan kapon, prenis Jankon sub la brako kiel katidon kaj elportis en la grenejon. Ĉu la infano ne komprenis la aferon aŭ estis timigita, sufiĉe ke ĝi ne eldiris eĉ unu vorton kaj nur rigardis, kiel rigardus birdo. Ĉu li scias, kion oni faros kun li? Sed kiam Staĥo en la grenejo distiris lin sur la tero kaj levinte la ĉemizeton forte ekbatis, tiam Janko ekkriis:

— Patrineto! kaj ĉe ĉiu ekbato de vergo li vokis: „Patrineto! patrineto!“ sed ĉiam pli mallaŭte, pli malforte ĝis ĉe ioma ekbato la infano silentiĝis kaj ne vokis jam la patrineton . . .

Malfeliĉa rompita violono! . . .

He, malprudenta, malbona Staĥo! kiu batas tiel la in-

fanojn? Gi ja estas malgranda kaj malforta kaj ĉiam ĝi estis apenaŭ viva.

Alvenis la patrino, forprenis la knabon, sed devis ĝin porti la domon. La duan tagon Janko ne leviĝis, kaj la trian vespere li jam mortadis trankvile sur la mizera lito sub sak-tola kovrilo.

La hirundoj babiladis en la ĉerizujo, kiu kreskis apud la pordo, radio de l' suno eniradis tra l' vitro de fenestro kaj superversadis per ora lumo la kapeton de l' infano kaj la vizaĝon, en kiu ne restis guto da sango. Tiu radio estis kiel vojo sur kiu la malgranda animo de l' knabeto devis foriri. Bone, ke almenaŭ en la momento de l' morto ĝi foriradis sur la larĝa suna vojo, ĉar en la vivo ĝi iradis ja sur pikaĵoj. Dume la malgrasa brusto movadis sin ankoraŭ per spiro, kaj la vizaĝo de l' infano estis kiel aŭskultanta la eĥojn de la vilaĝo, kiuj eniradis tra l' malfermita fenestro. Estis vespero, tial la knabinoj revenante de l' fojno kantis: „Hoj, sur la verda herbejo!“ kaj el la flanko de l' rivereto alvenadis la ludo de fajfiloj. Janko aŭskultis la lastan fojon kiel ludas la vilaĝo. Sur la litkovrilo kuŝis la violono el tegmenta tabuleto.

Subite la vizaĝo de la mortanta infano ellumiĝis, kaj el la blankiĝintaj lipoj elvenis mallaŭta voĉeto:


— Patrineto? . . . .

— Kion, mia filo? — respondis la patrino, kiun premadis la larmoj! . . . .

— Patrineto! Dio donos al mi en la ĉielo veran violonon!

— Donos al vi, fileto, donos! — rediris la patrino — sed ŝi ne povis paroli pli longe, ĉar subite el ŝia malmola brusto elrompis sin la kolektita malĝojo, tial nur ĝeminte: „Ho Jezu! Jezu!“ ŝi falis per la vizaĝo sur la keston kaj komencis ploregi, kiel se ŝi estus perdinta la prudenton aŭ kiel homo, kiu vidas, ke li jam ne elŝiros al la morto sian amataĵon . . . .

Kaj ŝi ne elŝiris ĝin, ĉar kiam levinte sin ree ŝi ekrigardis la infanon, la okuloj de la malgranda muzikanto



estis ankoraŭ malfermitaj, sed senmovaj kaj la vizaĝo tre grava, malluma kaj rigida! La suna radio ankaŭ foriris...

Pacon al vi Janko!

\* \* \*

La trian tagon la gesinjoroj revenis en la palacon el Italujo kune kun la fraŭlino kaj la fraŭlo, kiu penadis je ŝi. La fraŭlo diris:

— Quel beau pays que l'Italie.

— Kaj kia popolo de artistoj. On est heureux de chercher la-bas des talents et de les protéger... aldonis la fraŭlino.

Super Janko bruĝis la betuloj...

Fino.



# Nomaro


de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,  
kiuj eliris ĝis Marto 1891.

Nro.	Nomo de l' verko :	Kosto :
1.	<b>D-ro Esperanto.</b> (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa)	15 kopekoj
2.	— (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola)	15 "
3.	— <b>Langue Internationale.</b> Préface et Manuel Complet (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca)	20 "
4.	— <b>Internationale Sprache.</b> Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana)	20 "
5.	<b>R. G'eoghégán.</b> Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla)	20 "
6.	<b>D-ro Esperanto.</b> Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto kun antaŭparolo por Rusoj.	3 "
7.	— por Poloj	3 "
8.	— por Francoj	3 "
9.	— por Germanoj	3 "
10.	— por Angloj	3 "
11.	— <b>Dua Libro de l' Lingvo Internacia</b> (verkita en la lingvo Esperanto)	25 "
12.	— Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto)	10 "
13.	<b>Hanez.</b> Safah achath lekulanu (Lerno-libro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea).	20 "
14.	<b>A. Grabowski.</b> La Neĝa blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto)	15 "
15.	<b>L. Einstein.</b> La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto	50 "
16.	<b>N. N.</b> Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia	25 "
17.	<b>D-ro Esperanto.</b> Plena vortaro rusa-internacia	1 rublo
18.	<b>N. N.</b> Rusa traduko de la „Aldono al la Dua libro“	10 kopekoj
19.	<b>A. Grabowski.</b> La Gefratoj. Komedio de Goethe (en Esperanto)	15 "
20.	<b>L. Einstein.</b> Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Völpütük und Lingvo Internacia	25 "
21.	<b>D-ro Esperanto.</b> Meza vo.ĉaro internacia-germana	25 "
22.	<b>Henry Phillips, Jr.</b> An Attempt towards an International Language by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator	50 "
23.	<b>Hanez.</b> Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana	20 kopekoj

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA  
**KUL** Esperanto  
**297 II**

24. G. Henriclundquist. Dr. Espe (Lernolibro de la lingvo	
25. A. Demonget. Internacia on stein, traduction de Au	
26. E. de Wahl. Vortaro Espera	
27. G. Henriclundquist. Vortaro	
28. Klubo Nürnberga. La Lingvo internacia, voinstantiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörter- buch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein	25 "
29. R. Libeck. Starptautiska Waloda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch)	60 "
30. Kolekto da novaj verkoj (en Esperanto), kajero N-o 1	25 "
31. Adresaro de la Esperantistoj, kajero N-o 1	10 "
32. Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana	3 "
33. Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperanto- sprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana)	25 "
34. M. S. Bogdanov. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara)	50 "
35. Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono italia)	25 "
36. J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana)	20 "
37. A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' Interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto)	60 "
38. A. Zinovjev. Mejdunarodnyj jazyk »Esperanto	
39. Fr. Vi. Lorenc. Plena lernolibro de la lingvo »Esperanto« (por Bohemoj)	25 "
40. D. Gurevič. Sefer Hamilim. (Eldono hebrea)	20 "
41. L. Zamenhof. Vsemirnyj jazyk »Esperanto«. Polnyj učebnik s 2 slovarjami (Eldono rusa)	10 "
42. A. Grabowski. Du rakontoj en la lingvo internacia Esperanto	20 "

Ĉiuj supre skribitaj verkoj povas esti ricevataj en multaj librejoj; se Vi ne ricevos ilin en librejo, Vi povas sendi la necesan monon rekte al »L. Zamenhof, Varsovio«, kaj li elsendos al Vi la deziritajn verkojn rekte per la poŝto. Por la poŝta transsendo oni devas aldoni po 20% de la kosto de l' verkoj. Kiu aĉetas ne malpli ol por unu rublo, tiu por la transsendo ne pagas.

 Kiu volas ĉiam scii pri la progresado de la lingvo Esperanto, al tiu ni rekomendas la gazeton »La Esperantisto«. Ĝi eliras (en la lingvo Esperanto) unu fojon en la monato kaj kostas (kun transsendo) 2 rublojn por la tuta jaro. Eldonanto: Dr. L. Zamenhof, Varsovio, str. Nowolipki No. 21. Oni povas aboni je la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg. Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto de ĉia lando.

Fidela fotoreprezo laŭ la originalo kiun afable disponigis Internacia Esperanto Muzeo en Vieno.

Biblioteka Uniwersytecka KUL



1001144554

ONEJO KOKO  
penhago 1967.